Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

ESPERANTO-REVUO

Oficiala organo de la austria Esperanto-movado
Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung

Aperas monate

Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Àustrio. — Telefono U 23-1-80

5-a jaro NOVEMBRO/DECEMBRO 1950 n-ro 11-12

K R I S T N A S K O

Kristnasko! Festo de l gojo, festo de l' paco Festo de la nasko de Kristo, kiu montris al la homaro la vojon al la savo! Kiel tiu festo estas ciam la gojepia finsono de la forpasanta jaro! Cies koroj en tiuj ci tagoj batas iom pli solene kaj sopire - ja ciu preparas sin en tiu tempo por gojigi iun, iujn kun kiuj li ame aŭ amike estas ligita Ja vere la Kristnaska tempo estas la sankta festo .. de l' amo .. de homo al homo.

Sed tiu ci festo por ciu nun, bedaŭrinde, estas pli malpli nur festo interna limigita al la propra familio al parencoj kaj intimaj gekonatoj. Car ekster tiu ci interna rondo apenaŭ estas gojo paco amo. Ekstere estas malharmonio kaj ie ec furioza milito Ni konsideru tion kaj sciu ke gojemaj pacemaj harmoniemaj ni rajtas ne nur meti nin inter niajn karajn, pacajn kvar murojn, lasante la malpacan eksteron sorti kiel gi volas Car tiam tiu ci paco de l' hejmo estus grave endangerigita! Ni devas dum nia prava gojo en nia hejma rondo ne forgesi, ke ni ne nur havas sorton kiel individuo sed ankaŭ sorton kiel membro de l' socio, nacio kaj - pli vaste - kiel membro de la tuta homaro Car ni partoprenas ankaŭ la sorton de la socio nacio kaj tuthomaro Cu la tekniko ne jam interligis la sorton de la okcidentano kun tiu de la malproksima orientano? La respondeco de la individuo en la tempo de l' tekniko kaj demokratio kreskis gigante. Pro tio la unuopulo agus tre malsage se en tiu kriza tempo

li forturnus siajn okulojn de la dangeroj, kiuj minacas lin, kaj sin donus ekskluzive al la privatajoj en nia okazo al la festogojo de la Kristnaskotagoj. Li agus kiel struto, kiu en kazo de dangero metas la kapon en la sablon, opiniante sin tiamaniere savita. Ni ekkonu la veran sencon de l' Kristnasko kiu bedaŭrinde nuntempe jam pli multe estas populara popolmoro ol tio, kio gi estu - la memorfesto pri la nasko de Kristo, kiu venis sur la teron por savi la mondon. Kristo oferis sin por la homaro por ke estu "paco al la homoj sur tero, kiuj estas bonvolaj". Tion ni ne forgesu en nia Kristnaska festogojo kaj ni konfesu al ni, ke estas nia devo, kurage fronti al cio, kio kreas malgojon, malpacon kaj malamon, kaj pliintensigi la aktivecon por la sublima idealo de Zamenhof. Car ni Esperantistoj ankaŭ skribis sur nian standardon la vokon de l' Kristnaska tempo: "Pacon al la homoj sur tero ...!", por ke iam baldaŭ Kristnasko estos festo de interna, sed ankaŭ de universala harmonio!

Hugo Kraus

KARA KRISTINFAN'

de Oskar Lenek.

Kara Kristinfan',
Venu vi kun am',
La felicon portu al ni
Kun benanta man'!

El beata sfer' saluton
Portu el stelar',
Por ke gojvizaga igu
Cie la homar'!

Kara Kristinfan',
Kiel sankta flam'
Enkorigu al ni brile
De l' Savint' la am'!

Sonoril' Kristnaska kantas
Kaj l' ekstera vent'
Ke ni ciuj Diinfanoj
Estas en konsent'

Trad. H. Kraus

N I A M O V A D O E N A U S T R I O

TIROLO. S-ano Hans STEINER, kies salutkarton al la Esperanto-Centro ni citis en AER 9/10, en Informletero 5 raportis pri siaj E - somerkursoj en Tannheim, okazintaj de l' 31 7. -14.8.50 Ni sekvu liajn liniojn: "Kiel vi jam scias, la laborkomunumo "Internationale Jugendtreffen" invitis min gvidi E-kursojn en la kadro de la nunjaraj Internaciaj Junular-renkontoj en Tannheim. Kvankam mi jam havis inviton al senkosta ferio en Nederlando, mi decidis iri al Tannheim (oni donis al mi senkostan pensionon por la daŭro de la kursoj). Mi do prenis libertempon kaj alvenis en T. la 29.7.50. La tiea gvidanto de la I.J.R. klopodis fari propagandon por la kursoj, sed - je mia alveno li diris al mi: "S-ro Steiner, mi vidas la aferon nigra." Sed tial mi ne estis senkuraĝigita kaj iris tuj de domo al domo por persone inviti la enlogantojn kaj somergastojn al la kurso, kiun mi volis komenci lunde, la 31 7., je la 20.30 h. La tiea lernejestro donis al mi la siosilojn por la lernejo kaj promesis veni almenaŭ al la unua leciono. - Al la enkonduka priparolado, kiu estis anoncita por la 30.7. en gastejo "Schwarzer Adler" venis -- neniu -- kaj tial ankaŭ mi komencis dubi pri la sukceso de E-kurso en Tannheim.

Lunde vespere mi atendis en la lerneja ĉambro kun miksitaj sentoj. Iom post la 20.30 h malfermiĝis la pordo kaj envenis - mi tuj nombris - 14 "sciemuloj". Mi estis kontenta, disdonis la jam preparitajn lernilojn por la unua leciono kaj tuj poste mi komencis klarigi ĝin. Jam baldaŭ respondis la "sciemuloj" kontentige en E. Ili estis gajnitaj. Mi rimarkis, ke la "nekonata lingvo" plaĉis al ili. Fine mi disdonis ankoraŭ la preparitajn, masine multobligitajn porhejmajn taskojn kaj ni disiris kiel bonaj geamikoj.

La duan vesperon venis 18 interesuloj kaj la trian 20, ekde la kvara leciono estis 21 partoprenantoj. Ili restis fidelaj gis la kursfino kaj tradukis ĉiutage la 7-frazan taskon kaj venis ciam gojmiene. Inter ili estis la lernejestro de Tannheim kun tri plenkreskaj gefiloj, universitataj kaj gimnaziaj gestudentoj, profesoro el Vieno, la komunuma sekretario, pensiita gendarmeria direk-

toro, instruisto el Lech-valo kaj s-inoj kaj knabinoj el T.. Pluraj gekursanoj acestis E-gramatikon, kelkaj promesis aligi al la E-grupo en la hejmloko aŭ viziti duan kurson. Fine, kiel porciaman memorajon pri la "fulmkurso", ni faris belan fotobildon -

Alian kurson, similan al la Če-metodo, mi gvidis por italoj, libertempintaj en T Ĝi okazis ciutage je la 16a Tiun tempon la partoprenintoj mem elektis pro komence ciam malbona vetero. La unuaj kvin lecionoj bone funkciis kaj mi vere tre gojis. Sed poste venis kelkaj senpluvaj tagoj kaj la ge-italoj deziris promeni, ekskursi aŭ bani sin. Kaj tiamaniere la kurso cesis de si mem ĉar kursado je alia tagtempo al ili ne estis ebla Tamen ili petis min, ke mi skribu al ili en E. kaj ili promesis ankaŭ, ke ili aliĝos al la E-grupo en Milano aŭ Firenze, kie ili logas."

S-ano Josef BAUER 80-jara! S-ano B. multjara kaj ciam tre aktiva membro de la E-grupo en Innsbruck festis antaŭ nelonge en plena forto sian okdekjarĝon. Koran gratulon al tiu modela, de ciuj estimata kamarado!

La TIROLA ESPERANTO-TAGO okazis la 27.8.50 en Brixen im Tale. Okaze de tiu Esperantista evento la loko estis ornamita per standardoj sur kiuj krome pendis verda stelo. En la stratoj oni ankaŭ rimarkis la afisojn per kiuj oni invitis al la T.E.T.. La salonon de la gastejo "Mayrwirt", kiu estis elektita kiel kunvenejo, garnis E-flagoj, girlandoj kaj E-steloj. Je la 9.30 h s-ano E-landestro STEINER malfermis la jarkunvenon kaj salutis la membrojn de la E-landestraro, la reprezentantojn de la grupoj de Tirolo kaj Vorarlberg, la E-amikojn kaj neesperantistajn gastojn kaj speciale la ges-anojn el Salzburg (s-ro FÖTINGER, E-landestro, kaj s-ro KAPS, katedr vikaro, fondinto kaj prezidanto de la katol E-movado en Salzburg, k.a.). Post la E-himno, deklamita germanlingve de okjara lernanto Hans Krois, la vilagestro de Brixen en Valo s-ro BEIHAMMER parolis salutvortojn kaj esprimis sian gojon, ke la Esperantistoj elektis B por la T.E.T.. D-ro MAIOTKI kaj s-ano MAYER nome de la E-grupo Brixen respektive de la Trafikunuigo de B adresis salutojn al la kunvenintoj.

Dum d-ro MALOTKI prezidis okazis la raportoj pri la agado de la E-landestraro kaj somerkursoj en Tannheim kaj pri la kasaferoj. Intertempe alvenis novaj gastoj: kort kons Hugo STEINER, fondinto kaj direktoro de la Internacia E-Muzeo en Vieno, s-ano HILKERSBERGER, la meritplena konstruinto de la feria hejmo "Frataro" en Landeck kaj kun li s-ano Jean TUFFIER el Parizo. S-ro kort. kons. Steiner raportis pri IEMW; ankaŭ s-ano Tuffier alparolis la kunvenanojn per afablaj vortoj

La sekvintaj balotoj rezultigis jenan E-landestraron E-landestroj de Tirolo kaj Vorarlberg: Hans Steiner, Rolf Hauser; sekretarioj: Josef Erlacher, Ambros Stöckl; kasistoj: Karl Scheiflinger, Martin Stöckl; kontrolantoj: Franz Mitterberger, Peter Auer; konsilantoj: A Seiwald, W Gnaiger, A Hilkersberger, d-ro A. Karner, W. Lagger, ofic kons. K. Koller, O Steiner, F. Schwaiger, d-ro A. Malotki, Resi Lehrsperger, F Putzker kaj G. Kettl. La nova landestraro promesis meti sian tutan forton en la servon de nia movado.

Post priparolo de diversaj aferoj s-ano Rolf HAUSER kiel vicprezidanto de la Aŭstria Junulara Rugkruco, sekcio Tirolo, faris fajran kaj refresigan paroladon, kiu kaptis la intereson de la tuta ĉeestintaro. Kiam ankoraŭ s-ano HILKERSBERGER estis parolinta la E-landestro fermis la jarkunvenon. La posttagmezon oni pasigis kiel gaja societo kun muziko de la orkestro de Brixen. S-ano FÖTINGER el Salzburg en konvinka, elokventa maniero faris la festparoladon kaj NIA HERMANO (s-ano Visneider el Kufstein) gojigis per humorajoj. Aparte plaĉis ankaŭ la kantista horo de gelernantoj sub gvido de lerneja fratulino KOSTA, kiu prezentis popolkantojn en germana kaj E-lingvoj. Kiam je la 18a horo finigis la T.E.T. oni sentis, ke tiu ci grava Esperantista okazaĵo pasis kontentige en vere E-istaj amikeco kaj harmonio kaj la tuta samideanaro estis unuanima en la opinio, ke la E-grupo en Brixen kun la grupestro Peter AUER je la pinto meritas koran aklamon kaj dankon pro la granda kaj sukcesa preparlaboro por la landa E-festo. S-ano E-landestro Steiner finis sian raporton pri la arango per la vortoj: "Ni ne forgesos vin karaj Briksenaj geamikoj, kaj vian ĉarman vilaĝon, sed ni revenos kaj sendos ankaŭ aliajn geamikojn al vi!"

STIRIO: La biciklado de stiriaj E-istoj al Italio. De 1' 21.7.-13.8.aj. grupo da 8 stiriaj junesperantistoj biciklis tra Norditalio. En diversaj urboj ili estis gastoj de la tiesaj E-organizoj kaj prezentis por tiuj societoj stiriajn kantojn kaj kostumdançojn. En Torino ili partprenis al la 23a SAT-kongreso. Ĉie la junaj s-anoj kaj ties prezentajoj estis entuziasme salutataj kaj la propaganda efiko estis granda. En Milano la anonco pri la alveno de la grupo estis radie sciigata! Detala vojaĝoraporto estis farata la 11.9. en la Graz-a E - societo "Unueco". - La Stiria Laborista Ĉambro pagas la kotizojn por senlaboruloj, kiuj deziras fari la statan ekzamenon pri scio aŭ instrukapableco de E. en Graz. - De radio-Graz ekde Oktobro estas disaŭdigata denove E-kurso. Instruas prof. A. HAINSCHEGG. - "Konsolo en mizero", jen la E-titolo de la libreto "Trost im Trübsal" de Braumüller, modele tradukita kaj mendebla ĉe la E - landestraro de Stirio, Eichberg 72, Post Graz-St. Veit. Mendu tuj, car nur suficaj mendoj obligos la presigon! - E- prospekto pri Aflenz-Kurort estis eldonata kiel aldono al la bildprospekto. Ricevebla de Kurausschusz Aflenz-Kurort, Stirio. - Esperanto uzata en vintroprospektoj pri Stirio. La Landa Turisma Oficejo en Graz, Sandhaus, Hoftrakt, eldonis riĉenhavajn bildprospektojn pri Stirio. Ili estas persitaj en la lingvoj germana, angla, franca, itala kaj Esperanta! Mendu ilin por sendi ilin al viaj korespondantoj, per tio ili ekkonos nian hejmlandon pli detale. - En Aflenz-Kurort s-ano Peter ANGERER instalis kaj prizorgis murkeston, kiu ĉiam enhavas aktualan materialon. - Novaj kursoj okazas en Graz (universitato, teknika altlernejo, popolkleriga instituto kaj E-societo "Unueco") kaj en Leoben (Laborista Ĉambro), Turnau kaj Aflenz-Kurort. - Sukceso de la E-junularo de Graz. Laŭ invito de la E - grupo de Leoben, "Kuraĝo", la grupo de junaj ges-anoj el Graz kiu biciklo vojaĝis tra Norda Italio, prezentis fine de Septembro lumbildan raporton pri la vojaĝo. La grupo kantis esperantigitajn, belajn kantojn, kiuj plaĉis al ĉiuj. La ĉeestinta jurnalisto de la plej granda, loka gazeto poŝtan tagon publikigis empleksan artikolon pri la arango mem kaj pri E. speciale. La aktiva junula E-grupo projektas similajn prezentadojn ankaŭ en aliaj lokoj. - La E-

landestraro de Stirio planas organizi ankaŭ en aliaj lokoj de Stirio t.n. "Junulajn Esperanto-rondoj"-n, kiuj havu specialajn taskojn kaj kies programo enhavu precipe kantojn, muzikon, popoldancojn, migradojn kaj antaŭ cio vojagojn kaj kontaktadon kun aliaj aŭstriaj E-grupoj. La junaj E - istoj bv. ekrilati kun la E - landestraro de Stirio (adreson vidu supre!). (Ni gratulas al la junaj s-anoj en Graz pro la gusta kompreno de ilia tasko por E kaj al la E-landestraro de Stirio pro la entrprenema spirito. - La redakcio.)

VIENO: La 3-a Viena Esperanto-Tago, arangita de la Viena Esperanto-Delegitaro la 7-an kaj 8-an de oktobro, kunvenigis kiel ĉiujare multajn ges-anojn el Vieno kaj gastojn el la provinco. Sabate posttagmeze okazis la detalaj raportoj pri la internaciaj E-kongresoj en la ejego de la E-grupo "Harmonio", kiu kiel kutime gastigis la arangon. Meritas laŭdon la Viena E-junularo, kiu kun dicemo prizorgis la ornamon de la kunvenejo kaj ec konstruis scenejon por la skecoj kaj gajaj prezentadoj, kiuj sekvis la seriozan parton de la programo. Inter alio estis prezentata unuaktajo de la fervora s-ano Johann KRAL, estro de la E-klubo "Konkordo", kiu traktis enketon inter la reprezentantoj de diversaj gravaj administracioj pri la solvo de la lingva dilemo. E-kantojn prezentis la akordeon - kant - kaj gitarterceto HAIDERER-OHRENBERGER-KRAUS, kiu rikoltis grandan aplaŭdon. La dimanca post - tagmezo unuigis la migremajn ges-anojn por ekskurso al Leopoldsberg.

IEMW, la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, direktis insistan peton al la internaciaj kaj landaj E-asocioj kaj la individuaj s-anoj pro kunlaboro en la intereso de la E-movado. Ni jen sekvigas la alvokon:

"Ni bezonas 1) detalajn informojn pri la nuna stato de la movado en via lando sur diversaj laborkampoj; 2) regulajn informojn pri ciuj novaj sukcesoj, ec sukcesetoj; 3) eldirojn de fakuloj, malnovajn kaj novajn (ni deziras publikigi ilin parte en nia "Informilo de IEMW" kaj krome en aparta bro-

ŝuro "pri la stato de nia movado en tutmondo" ĉiun jaron en printempo, por tiel helpi al la propagando por nia lingvo!); 4) materialon ĉiuspecan pri kaj en E, por niaj kolektoj (ne forgesu pri la kompleta materialo de la universalaj kaj landaj E-kongresoj, estintaj kaj estontaj); 5) fotojn kaj biografiojn de metirtplenaj ges-anoj en via lando por la Panteono de IEMW (temas pri vivantaj kaj mortintaj ges-anoj); 6) novaperintan materialon (librojn, broŝurojn, afiŝojn ktp.) por ke la kolektoj en IEMW estu kompleta spegulo pri E; 7) viajn tradukojn de eminentaj verkoj kaj originalajn verkojn, kiujn vi ne kapablas presigi;ni bindigos ilin bele kaj konservos en IEMW kaj rajtos publikigi ilin nur en konsento kun la verkintoj, se eble, por ke ili ne perdigu por la E-movado; 8) ni petas, ke vi igu "Subtenantaj Membroj" de via E-muzeo. La kotizo ĝis fino 1951 estas 6 respondkuponoj kaj vi ricevos ekvivalente al tiu malgranda sumo 5 numerojn de "Informilo" kaj membrokarton. La novaj membroj estos menciitaj en la venonta n-ro de la Informilo.

Donacojn monajn kaj materialajn ni publikigos en Informilo. Jam nun nian antaŭan dankon!

Aro da kunlaborantoj en la muzeo atendas viajn sendaĵojn.

100 TUTMONDAJ ADRESAROJ ankoraŭ estas haveblaj kontraŭ 12 resp. kuponoj. Instigu viajn konatojn al mendo! Dankon." IEMW.

La supre menciita "Informilo de IEMW" estas hektografita gazeto, kiu laŭ la indikoj sub la titolo aperus kvaronjare kaj kostas por 1950/1951 (5 n-roj) 6 rk. por membroj gi estas senpaga. Redaktoro estas s-ro kortega konsilanto Hugo Steiner. La 1-a pago de n-ro 1 (oktobro 1950) kun saluto al la Esperantistoj kaj gratulo al la jubileantaj pioniroj Paul Christaller (90jara) kaj Paul Nylen (80jara) enhavas liston de la dumvivaj kaj subtenantaj membroj de IEMW. Membroj dumvivaj pagas unufoje minimume 25 int. resp. -kup. kaj ricevas dum 3 jaroj senpage la Informilon. Iliaj nomoj estas eternigataj sur tabuloj en IEMW. Membro subtenanta pagas por la resto de 1950 kaj

1951 minimume S r k. Gi ricevas la Informilon, aniute 5 kajerojn. Cetere oni povas ankaŭ aligi al la fondita grupo de "Favorantoj" (kotizo minimume S100 .- aŭ 60 r. k.) kaj "Enlandaj Subtenantoj" kies kotizo estas S 6.-- po jaro. En tiu konekso oni eksciis ke kiel "Favorantoj" membrigis la cefprincepiskopo de Salzburg, eksc-elenco d-ro Rohracher kaj la aŭstria ligokanceliero ang d-ro Figl. La Informilo sciigas ankaŭ ke la Austria Ministerio por Instruado disponigis al la muzeo por 1950 subvencion de S 6.000 .- (La redakcio) -

En la E-kluboj KALOCSAY-LABORO, E-fakgrupo de Volkshochschule Währing kiu kunvenas jaŭde de la 19-21 h. s-anino Jolanthe LESER mirige elokvente kaj interese rakontis novelon de Schnitzler, s-ano Raymund CECH legis el la poezio de aŭstriaj E-verkistoj kaj s-anino Mathilde KINDL kaj Aranka JANITZKY aklame dankitaj montris lerte kompilitan lumbildaron de la vojaĝoj al la E-kongresoj en Parizo, Bournemouth kaj Romo. Per humoraj lumbildoj gajigis la geceestantojn la fervora kaj iniciatema s-ano Robert NOVACEK. La fakgrupo eldonis liston de sia granda bibliotheko, kiu estas je dispono al ciu membro kaj gasto.

MALSUPRA AUSTRIO: La E-societo "Verda Lumo" komunikas la okazigon de kurso por komencantoj en la popol- kaj ĉeflernejo de Hohenberg, kiun partoprenas entute 15 personoj, grandparte gejunulcj. La kurso okazas en la kadro de la Laborista Ĉambro S-ano Franz LAMPL kun entuziasmo instruas. - La komuna informilo de la E-grupoj "Voith-uzino" kaj "Nova Tempo" anoncas jenajn kursojn: kurson elementan kun 10 personoj, gvidata de s-ano WITHALM; kurso por progresintoj estas gvidata de s-ano FELLBACHER. En januaro ekokazos kurso en Voith-uzino. - La E-grupoj el St. Pölten eldonas hektografe komunan leteron por spari afrankon. Pri la E-tago de Malsupra Aŭstrio al la redakcio bedaŭrinde mankas raporto.

SUPRA AUSTRIO: Okaze de la "aŭstria kultursemajno" la Esperantistaro de Linz estis invitata al kunagado. La Linz-a E - grupo sub la fidinda gvidado de s-ano Karl NIGL tuj reagis kaj okazigis la 21.11.50 en la kinosalono de Arbeiterkammer lumbild- kaj filmprezen-

tadon pri la ĉi-somera eksterlandvojaĝo tra Germanio kaj Danlando aranĝita de la Esperanto-Turisma-Centro.

AUSTRIA ESPERANTO-INSTITUTO

La laborkunsido de la Aŭstria Esperanto-Instituto, okazinta la 11-an de oktobro 1950, traktis kaj decidis:

1.) pri instruistaj aferoj: a) peti la estrojn de la ekzamenkomisionoj en Graz, Innsbruck kaj Salzburg, regule sendi al AEI mallongajn raportojn kun la nomoj, adresoj, profesioj kaj ekzamenrezultoj de la ekzamenitoj; b) komisii la nove fonditan instruistan fakgrupon en Vieno (per adreso de s-ano Gschanes), plugvidi la pedagogiajn aferojn de AEI en ties kadro; c) rajtigi sekretarion Werner al publikigo en la semajngazeto "Volkswoche" E-kurson kun la indiko "Geleitet vom Österr. E.-Institut

2.) pri sciencaj aferoj: konigi la decidojn de la scienca sekcio de la Universala Kongreso en Parizo al la aŭstriaj scienculoj, invitante ilin al simila uzo de E. per Esperanto-resumoj de sciencaj artikoloj ktp.; samtempe gratuli al la japanaj scienculoj pro ilia modela ekuzo de E. por sciencaj disertacioj;

3.) pri literaturaj aferoj: daŭrigi la kolektlaborojn por la decidita Aŭstria Antologio kaj ek de la venonta kunsido denove deĉiĉi la duan horon por priparolado de lingvaj problemoj.

E. Werner, sekretario.

KATOLIKA ESPERANTA VIVO

AKLE, Vieno, leteradr.: W. Mudrak, Vieno 3., Beatrixg. 19; kunvenas 1., Graben 13/II/25, ĉiun 2an kaj 4an mardon de la monato de la 17a-19a (lingva perfektigo, prelegoj: kantado). Ĉiumarde (19-20.15 h) kurso por komencantoj.

Grupo "Estonteco", Salzburg, adr. ĉe grupestro Domvikar J. Kaps, Salzburg-Parsch, Gaisbergstr. 7. - Liglandaj sekretarioj: por Stirio d-ro A. Halbedl, Knittelfeld, Schmittg. 15; por Karintio: F. Casar, Klagenfurt, Brunnplatz 3. -

AKLE, Vienon, vizitis je la 10.10. nia malnova, kara s-ano P. Raynald Schmalbaug, O. Cist. el abatejo Zwettl.

Okazis paroladoj pri Sta. Hildegardo, Sta. Francisko, Sta. Leopoldo, pri la nova dogmo (de la ĉielenpreno de Maria) (s-ano GASPERINI), pri la IKUE-kongreso en Romo (s-anoj instr. KAINZ kaj MUDRAK), pri aparta Rom-vojaĝo (s-ano HUBER). Okazos Kristnasko-festeto merkrede, la 27. 12., je la 17a-20a horo.

En Ottendorf, Stirio, parolis s-ano instr. KONRAD pri la Roma kongreso. -

ESPERO KATOLIKA, la oficiala organo de IKUE kostas pojare ekde 1951 S 30.-- (pagoj al poŝtsparkasa konto 105713 - W. Mudrak).

Raportis pri la Roma IKUE-kongreso i.a. "Kalasantiner Blätter", oktobro 1950 sub la titolo"Die katholische Arbeiterjugend und E."; "In heiliger Sendung", 11. Heft, sub "Der XXII Internationale Kongreß katholischer Esperantisten".

AL ĈIUJ NIAJ KARAJ GESAMIDEANOJ GRACOPLENAN KRISTNASKON KAJ RIĈAN BENON POR LA NOVA JARO!

AKLE.

SOCIALISTA ESPERANTISTARO AUSTRIA

La plejmultlegata semajna revuo "Die Frau", kiu dum jaroj regule tutan E-kolonon en lasta tempo disponigas nur ĉiun duan semajnon malgrandan spacon por Esperanto. Sed ankaŭ tio estas minacata, se ne la redakcio per sufice multaj alskriboj povas konstati certan interesón por la rubriko. Bedaŭrinde nia lasta alvoko ne trovis la necesan ĥon. Pro tio ni insiste ripetas nian peton al niaj geamikoj de tempo al tempo skribi al "Die Frau" kaj instigi ankaŭ aliajn ges-anojn (ankaŭ en eksterlando) fari la saman.

FERVOJISTA FAKGRUPO

La jarkunveno de la E-fervojistoj okazis la 3an kaj 4an de aŭgusto en Landeck - Tirolo. Pri ĝi raportas la novelektita dua sekretario, s-ano Alois RAMSCHAK. jene:

"Nia kunveno la duan fojon dum la evoluo de nia juna movado okazis en Landeck, pli ĝuste en alpa kabano, en "Fritz-Schutzhütte". En bona memoro estas ankoraŭ la

unua kunveno, dum kiu ni parlamentadis en alpherbeja valbaseno, en libera aero, najbare de rokmontoj, cielen montrantaj Tiu kunsido kvazaŭ estis por ni optimismiga simbolo: Esperanto grimpis alten!

La nunjara konferenco estis malfavorata de la vetero Ni devis kunsidi en la malvarma kabano. Tamen nia optimismo estis le sama, kiu esprimigis en la kontentigaj raportoj. Ni povis konstati ke la programo siatempe decidita en multaj punktoj plenumigis En la belaj majotagoj okazis en Salzburg la IFEF-kongreso Ni akiris la simpation de la Ĝenerala Direkcio kaj nia fakgrupo aparteneze al la kleriga fako de la sindikato Kvankam nia rondo ankoraŭ ne konsiderinde pligrandigis ni tamen estas optimismaj! Ni plifortigos per niaj daŭraj klopodadoj! - Parcoprenis al nia konferenco nia sveda kolego BIELEFELD el Eskilstuna, kiu estis travojaganta Aŭstrion por poste viziti Italion, Francion kaj Anglion Jen ni prezentas al vi nian novan estraron: Fakgrupestro - kolego SIGHARTNER (Linz Franzstr. 57/II) sekretario - kol ZINK (Vieno 10 „Ecconomog 33) kasisto - kol HAWLA„ Vieno kontrolo - kol BÜRGER kaj ANTEL Lanoaj delegitoj estas la kolegoj RAMSCHAK (Karintio) ULLREICH (Malsupra Aŭstrio), ANGERMAYER (Supra Aŭstrio) ZUBER (Stirio), STOCKL (Tirolo) SEIWALD (Vorarlberg) kaj ZINK (Vieno)

Estraro de la E grupo de la fervojista sindikato MAGERBAUER (estro) MAREK (sekr.) HAWLA (kas.), Estraro por IFEF: RILKERSBERGER (estro) ZINK (sekr.), HAWLA (kas.).La landaj delegitoj estas sampersone delegitoj de ĉiuj tri grupoj. - La kunvenintoj decidis, ke kvaronjare okazu estrarkunsidoj en diversaj lokoj kaj la plej proksima estas arangata le 9 kaj 10-12-50 en Mistelbach

La jarkunveno 1951 estu en la sama loko kie okazos le AEF-kongreso, unu tagon antaŭ la AEF-kongreso. Koresp: poŝtadreso: ZINK, Wieao 10 , Ecconomogasse 33

La preparadon de la radioparoladoj dankinde prenis sur sin denove s-ano ZINK, kies meritoj sur tiu kampo de ciuj kolegoj unuanime estas rekonataj

Atentu! La 3-a Internacia Fervojista Kongreso okazos la 16.-20.5.1951 en Parizo. Por ricevi la programon kaj kondicojn de partopreno, petu pri la kongres-informilo de la LKK de la 3a IFEF-Kongreso al: Franca Fervojista Esperanto-Asocio, II, rue de Milan, Paris IX e!

E L L A
I N T E R N A C I A E S P E R A N T O - M O V A D O
Zigzage kaj telegrame tra la mondo

La 36a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO okazos de la 4a - 11a de aŭgusto 1951 en Munkeno (München). la adreso de ĝi estas: (13b) München-Pasing, Engelbertstr 7 La kotizoj estas jenaj: gis 31 12 50 S 60 gis 31 3 51 S 70 poste S 80 por la ordinara kongresano; edzino aĝ edzo de la anoncit(in)o la duono Gejunuloj ne pli ol 20jaraj S 20, resp 22 50 kaj 25 La provizora programo: Interkona vespero, solena malfermo de la kongreso, oficiala fotado, malfermo de la Internacia Somera Universitato kursoj de la kvar sekcioj Generala Kunveno, Internacia Somera Universitato kun prelegoj de internaciaj eminentaj profesoroj, komuna ekskurso al la lago Starnberg (ce la rando de la alpoj) kun ŝipveturado kaj danco sur la ŝipo Internacia Balo solena fermo, fakkunvenoj de samfakuloj cefa jarkunveno de UEA Detalajn informojn petu de la cefdelegito de UEA s-ano mag Franz HOFERT, Viena 14 Penzingerstr 121. -

Nova Esperanta vivo en Ĉinio. "Post la liberigo de Ŝanhajo la E-istoj en tiu urbo tuj sin reorganizis kaj refondis en aŭgusto 1949 la Ŝanhajan E-istan Ligon (ŜEL) Komence ĝiaj membroj nur nombris 54 kaj nun (en majo ĉj. - la red.) ili plimultigis pli ol 200 Kunlaborante kun Ŝ E L., la "Amasa Librejo" en Ŝanhajo eldonas la monatan gazeton "Popola Mondo" Gi estas parte cinlingva parte Esperanta Adreso: Ŝanhaja E-ista Ligo, postkesto 636 Ŝanhajo, Ĉinio - La Popola Radiostacio en Ŝanhajo tre interesas sin pri la E-movado. Gi invitis ŜEL, diskonigi aŭdigi paroladojn pri E. en 6 sinsekvaj tagoj Poste gi decidis akcepti tiajn paroladojn por la regula programo 3 fojojn semajne." Tion ni ekscias el la impona ĵurnalsimila gazeto "El Popola Ĉinio", kiun eldonas la fremdlingva Eldonejo en Peking, 26 Kuo Hui Chie Tiu ĉi gazeto aperas tute en E. kaj enhavas amplekson varian materialon kun lignogravuraĵoj kaj poemoj ŜEL deziras interŝangi sian organon kaj la 1-an volumon de la Ĉina Antologio, la elektitaj noveloj de Lusin ekvivalente al samvaloraj gazetoj kaj libroj kun ĉiulandaj E-grupoj kaj individuaj E-istoj Skribu al la supra adreso! -

La Internacia Junular-Kunveno de TJO 1950 direktis pacdeklaracion al UNO kaj ricevis respondon, kiu diras, ke UNESKO transprenis gin por plua prilaborado. La deklaracion estis subskribintaj la 430 partoprenintaj junaj E-istoj. - La Deutsche Bundesbahn (Germana Liga Fervojo) eldonis prospekton por ferioj en Germanio. - KLM la Reĝa Nederlanda Aertrafika Kompanio, pro la 36a UEK en Munkeno transdonas en sia aparta prospekto salutojn al ĉiuj partoprenontoj. - La Unua Internacia Kontraŭmilita Muzeo estis fondita per la pacista verkisto Ernst Friedrich, (libro: Militon al la milito!) 1923. Ĝi estis detruata de la hitleristoj 1933 kaj E. Friedrich, kiu estis elmigrinta, dum foresto kondamnigis je la morto. 1936 F. rekonstruis la muzeon en Bruselo. Tie gi denove estis vandalata 1940 dum la milito. Nun gi renaskiĝu kiel migranta ekspozicio kaj enhavu Esperanto-angulon! Sendu do memorajojn, fotojn, dokumentojn kaj ev. mondonacojn al: Ernst Friedrich, 90, Foubourg Poissoniere, Paris XXieme! - La Komununma Universitato de Amsterdam enkondukis Esperanton. F-ino Emma C. Lander testamente dedicis al Elizaoethtown - College (universitato en la Usona stato Pennsylvania) por la instruado de E. la sumon de 15.000 dolaroj.

De UEA ni estas petitaj, aperigi jenan informon: Sur paĝo 146 de la "Tutmonda Adresaro de Esperantistoj" de Hugo Steiner estas indikite, ke tiu libro estas mendebla kaj pagebla ĉe la ĉefdelegitoj de UEA. Tiu informo ne estas ĝusta, ĉar UEA neniam donis tiun promeson.

La redakcio

K o r e s p o n d o

A ŭ s t r i o :

Per la aŭstria Esperanto-poŝtmarko afrankos respondon al alsenditaj infandesegnoj (ago, lernejo!) Esperantofakgrupo en Volkshochschule, Vieno 110 Schopenhauer - strato 49

RUKEDI. Henriko, Achgasse 34, Bregenz, Aŭstrio, dez interrilati kun aŭstriaj E-istaj framasonoj

P o l i o :

DANOVSKI Vaclav, Varsovio-Chmielna 28, dez kor. kun getajloroj kaj filatelistoj.

J u g o s l a v i o :

Ing. BANIC Ivan, Zagrab, Trenkova 12 au Gospic, dez. kor. kun junaj geesp. pri Aŭstrio, agronomio, filmo, teatro, il. pk., respondo garantiita!

RUTNIK Rastka, Maribor, Zidovska ul. 14, dez.kor. kun ges-anoj Esperante kaj germane pri diversaj temoj.

B u l g a r i o :

Laliu C. Lalev, Berlievo Sevlievsko, 21jara, div. temoj

Ĉ e h o s l o v a k i o :

VILD Jos., faka instruisto, Rokycany 116/II, dez. intersangi postmarkojn kaj postkartojn.

SOBOTKA Jiri, 22jara, Ĉeska Lipa 197, serĉas gajan s-aninon por kor., intersango de E-gazetoj ktp.

PISTORA Jiri, Kolonie 986, Nymburk, dez. kor. per Let kaj il. pk.

KIU DEZIRAS amikan aŭ komercan korespondon aŭ intersangon de pm., pk., libroj, gazetoj, moneroj kaj aliaj kolekt-kuriozajoj, aligu al INTERNACIA KORESPONDA KAJ KOLEKTANTA KLUBO. Skribu al: prof. Petro Zevl, Kralovice u Plzne.

WOLLRAB Walter, Pertyzanska 1633, Ceska Lipa, 20jara, dez. kor. kun s-anino.

H u n g a r i o :

E.V. Antonio de ~~KOSOS~~ KORŜOS, grafikisto kaj filmverkisto, Hödmezövàsàrhely V., Károly utca 29, dez. kor. kun ges-anoj.

H i s p a n i o :

RODES Emilio, strato Torrebadal 13, Badalona (Barcelona), 25jara presisto, dez. kor. kun ges-anoj aŭ intersangi kuriozaĵojn.

Fervoja esperantistino el Innsbruck, Rozo Wiendl, dumtempe restanta en Svedio bezonas urĝe bildkartojn el ĉiuj regionoj de Aŭstrio por fari lumbildparoladon en sveda esperantista rondo pri Aŭstrio. Ŝi promesas laŭ deziro redoni ilin. Bonvole oni adresu al: Rozo Wiendl ce familio Kvist, Deje Box 109/a, Schweden.

Ni kvitancas jenajn donacojn por la propagandofonduso: Junulara grupo S 25; grupoj "Suno" S 100 kaj "Harmonio" S 20; ges-anoj Berdan S 5, Bauer S 60, Gasparini S 50,

Jaksch S 10, Mikunda S 10. Sinner S 10; entute S 290.
KORAN DANKON AL CIUJ!

Por la hejtado de la Esperanto-Centro donacis: grupoj Laboro S 20, Harmonio S 20, ges-anoj Cakl S 5, Feichtinger S 50, Jeitler S 5, Ziwutschka S 5; entute S 105.
ANKAŬ AL ILI ELKORAN DANKON!

* * *

Ce T R A M O N D O estas haveblaj jenaj libroj:

Faŭsto I	S	39 --
La dektria mortis	S	26.50
Invito al ĉielo	S	19 50
Inter sudo kaj nordo	S	24 --
Leteroj de Zamenhof	)	prezo laŭ Katalogo
Leteroj de Lanti	)	
Vivo de Rosa Luxenburg	)	
Elena Vortaro (de SAT)	)	

Je Kristnasko kaj la tago de l' Esperanto-libro
CIUJN LIBROJN NUR PER "TRAMONDO" VIA LIBERJO!!
Wien I, Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)

* * *

Eigentümer und Herausgeber: Österr. Esperantistenverband. Verlag: "Tramondo". - Verantwortlicher Redakteur: Hugo Kraus, sämtliche Wien I., Neutorgasse 9 (Tel.: U 23180)
Druck: Hans Likan, Wien VI., Mollardgasse 85a